

ESPERANTO PROVENCE

Numero 89 - Somero 2012

4 numeroj/jare



redaktoro:

Pascal Vilain

p.vilain83@orange.fr

61 montée du Castelar

83460 TARADEAU

04 94 73 33 24

kasisto:

Michel Cerisay

mcerisay@gmail.com

15 Place des Vents Provençaux

13140 MIRAMAS

baza kotizo al la Federacio (kun bulteno): 5 eŭroj

VORTO DE LA PREZIDANTO

Baldaŭ finiĝos la studado en niaj diversaj kursejoj ; nun alvenas periodo por renkontiĝoj, vojaĝoj, ktp. Do, por la esperantistoj, tiu momento estas ebleco taksii siajn proprajn progresojn en la lingvo. Se malfeliĉe vi opinias vian nivelon ne tute akceptebla, vi povos ankoraŭ plibonigi ĝin en

Greziljono, Kvinpetalo aŭ Pluezek, lokoj kie vi povos studi kaj renkonti multe da fremdaj samideanoj por babilado.

Bonan aktivan someron kaj agrablan ripozon al ĉiuj !

Pierre Oliva

GRAVA EVENTO

La 9an de Junio 2012 okazos en Avinjono sesio de la tutmonda KER-ekzameno.

Ĝi disvolviĝos en salono de la ESC (Socia Kultura Centro) - Espace Social et Culturel - de la Croix des Oiseaux, rue du Tambour d'Arcole.

La naŭ inskribiĝintaj kandidatoj alvenos minimume duonhoron antaŭ la 9a. El ili, ses estas klubanoj de Avinjono kaj tri el najbaraj urboj. Fine, sep personoj trapasos la B1 nivelon kaj du la C1.

Al ĉiuj, ni deziras sukceson.

informis Rose-Marie Quintin

Limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta numero : 31a de Aŭgusto 2012

**MEMBRO-KUNVENO
EN ROMANS-LA 24-AN DE JUNIO**

Ĉe la sidejo de la klubo « Bona Stelo », je la strato Diderot n°6

ASOCIAJ RAPORTOJ POR LA JARO 2011

1 - Morala

Mi skribas tiun raporton nur kun la espero, ke dum nia ĝenerala kunveno ni diskutos pri la situacio de Esperanto en P.A.C.A.

Kutime, mi estas optimista, do mi pensas, ke nia grupo bone funkcias konsidere la nombron de ĉeestintoj, kiuj partoprenis ĝis nun en niaj diversaj renkontiĝoj, eĉ se ni eble iomete somnolas...

Sed je praktika flanko, mi konstatis, ke la kutimaj helpantoj kiel urboj, akceptejoj, restoracioj... pli kaj pli ne respondas aŭ ne kongruas kun niaj deziroj, aŭ - ankoraŭ pli malbone - proponas prezojn multe tro altajn rilate nian pagkapablon.

Negativa agmaniero estis ankaŭ tiu de la urbo La Ciotat, kie neniu el la urbodomo diris al ni, ke la lokoj antaŭviditaj por la novembra staĝo estos fermigitaj nur du tagojn antaŭ la evento...

Je la esperantista flanko, ni povas konstati, ke venas al niaj renkontiĝoj preskaŭ ĉiam la samaj partoprenantoj. Ĉu pro manko de mono, ĉu pro la fakto, ke junaj aŭ novbakitaj esperantistoj ne interesiĝas pri niaj staĝoj, aŭ eble ĉar ni ne kapablas interesi ilin ?

Jen kelkaj diskuttemoj por nia ĝenerala membro-kunveno en Romans.

Pierre Oliva

2 - Agada

1-Membraro :

Espéranto-Provence : la Federacio havis 80 membrojn je la 31-a de Decembro 2010.

13 grupoj en la jenaj departementoj kaj urboj :

04 : Manosque kaj Villeneuve ; 05 : Gap ; 06 : Nice, Cannes ; 13 : Aix en Provence, La Ciotat, La Roque-d'Anthéron, Miramas ; 83 : Fréjus – Saint-Raphaël, Toulon ; 84 : Avignon, Carpentras.

2-Administro :

Membrokunveno okazis en Saint-Raphaël la 22an de Majo 2011.

Elektitaj estis la jenaj komitatanoj :

Arnaud Monique ; Cerisay Michel ; Demongeot Claudie ; Gonzales Isabelle ; Mimmersheim Franz ; Oliva Pierre ; Prezioso Monique ; Spanjaart Thierry ; Triolle Renée ; Wallez Gilles.

unu ŝanĝo : demisias *Wallez Nicole.*

Prezidanto : Pierre Oliva

Vic-Prezidantino : Monique Prezioso

Sekretariino : Monique Arnaud

Help-Sekretariino : Claudie Demongeot

Kasisto : Michel Cerisay

Respondeculoj pri la bulteno : Pierre Oliva / Pascal Vilain

Rilatoj kun Espéranto-France : Monique Arnaud / Gilles Wallez.

3-Informado :

3.1 Interna komunikado

3.1.1 Bulteno

La federacio daŭre eldonas sian ĉiutrimonatan bultenon : « *Espéranto-Provence* ».

Ĝin redaktis Renée Triolle kaj ekde la numero 87, Pascal Vilain.

Unu klubo eldonas propran bultenon.

3.1.2 Listo Provenco

Pri ĝi respondecas Olivier Faurax. Ĝi celas rapide komuniki al ĉiuj informojn el Francio aŭ el la regionoj. Multaj ne ankoraŭ aliĝas.

3.2 Ekstera komunikado

3.2.1 Partopreno en aliaj aranĝoj

La diversaj kluboj partoprenis en multaj neesperantistaj aranĝoj :

forumoj de la asocioj en– Aix, Manosque, La Ciotat, Gap.

ekspozicioj en Manosque, Gap, La Ciotat, Saint-Raphaël.

Februaro 21 - Tago de la gepatra lingvo en La Ciotat, en partnereco kun asocio « Le Grand Portique », kaj en Saint-Bonnet en lernejo. Laŭ iniciato de UNESKO, la 21a de Februaro estas dediĉita al la patrinaj lingvoj, la lingvo en kiu ĉiu homo strukturigas sian penson kaj malkovras la mondon. En La Ciotat, kun la asocio «Le Grand Portique», kunvenis dudeko da homoj por diversmaniere aŭdigi diversajn lingvojn. Artikolo kun foto aperis en «La Provence» kaj «La Marseillaise».

Marto 08 - Tago de la Virino : en La Ciotat, 3 virinoj promenis en la bazaro kun verdaj pluvombreloj ; dum la tuta tago estis budo, kie oni rikoltis subskribojn por la peticio « Espéranto au Bac ».

Aprilo 16 - Socia Forumo en Gardanne (13).

Majo 21 - Danca Festivalo en Saint-Savournin (13). Françoise Noireau gvidis fulmotondran kurson, kiu venigis kaj entuziasmigis 12 homojn. Ĵurnalistoj filmis.

Majo 29 - en La Roque-d'Anthéron, okaze de la Festo de la ĉerizoj, la grupo starigis budon kaj informis pri Esperanto.

Junio 11 - « Fête du CIQ-Fontsaite » en La Ciotat : lernantoj prezentis teatraĵeton.

Junio 26 - en Sainte Tulle : Festo de la Solidareco.

Junio 27 - en Gap : Festo de la Pacmovado en agrabla parko de Charance.

Aŭgusto 26-27-28 - Esperanto kaj malkresko : manifestacio kontraŭ la skista gaso en Les Cévennes.

Septembro - Tendumejo de Vallon-Pont-d'Arc.

Septembro 11-12 - Foiro « Bio-Génépi » en Embrun.

Oktobero - Mondissimo en Aubagne (13) dum tuta semajno, kun bela budo.

Oktobero 08 - Festo de la Placoj en La Ciotat : okazo trafi preterpasantojn, kiuj ne vizitas organizitajn aranĝojn.

3.2.2 Amaskomunikiloj

En Manosko, la grupo ĉiam provas rilati kun lokaj gazetoj, diversaj lernejoj (inter ili la Internacia Lernejo

—en Manosko kaj Sainte-Tulle), kun la Centro de Cadarache, la respondeculoj de la Junuldomo kaj de la Mediateko, kaj vizitas la trinkejon « Café Polyglotte ». Novaj paneloj indikas "straton Zamenhof".

Okaze de eventoj, la lokaj gazetoj informis kaj raportis, plej ofte kun fotoj (ekz. en La Ciotat aŭ Saint-Raphaël).

3.2.3 TTT-ejo

Ĝi estis reorganizita dank' al Franz Mimmersheim. Ekde la kongreso, unu respondeculo el ĉiuj grupoj rajtas senpere enigi informojn kaj raportojn. Tio ankorau ne funkcias 100%.

3.3 Disponigebla materialo

Nia Provenca Federacio disponas pri ekspozicimaterialo de Esperanto-France kaj senpage disponigas ĝin al la kluboj, kiuj bezonas, same pri tendo por protekti sin de la suno.

4-Instruado kaj ekzamenoj :

La diversaj kluboj organizis regulajn dumjarajn kursojn kaj iniciajn staĝojn en klubejoj, lernejoj.

4.1 Kursoj

4.2 Staĝoj

Konversacia staĝo okazis la 20-an de Marto en Manosque por plibonigi la parolkapablon de la organizantoj de nia printempa rendevuo.

Kurso pri tradukado estis proponita

La klubo de Fréjus –Saint-Raphaël organizis M.E.S., unusemajnan staĝon ĉe la marborbo en Agay ; tre sukcesa kiel kutime kun partopreno de multaj eksterlandanoj.

La intensivan staĝon en La Ciotat komence de Oktobro vizitis 3 homoj.

Kiel kutime, la kultura semajnfino de La Ciotat, kun trinivelaj kursoj, okazis en Novembro 2011 malgraŭ lastmomentaj teknikaj malfacilaĵoj.

4.3 Ekzamensesio

Ĝi okazis en Collège Pasteur en Marseille. Estis kandidatoj al la 1a, 2a kaj 3a gradaj ekzamenoj de Franca Esperanto-Instituto.

La Komitato de Esperanto-Provence decidis pagi la kostojn por la membroj de la federacio, por stimuli aŭ kuraĝigi la lernantojn trapasi la ekzamenojn de FEI.

4.4 Praktikado

Por praktiki la lingvon ekster la klaso, estis proponitaj diversaj senpagaj vizitoj de ekspozicioj, ĉefe en Marseille. Same en Fréjus, okaze de la Nacia Tago de Monumentoj en Septembro.

5-Kulturo kaj aranĝoj :

5.1 Prelegvojaĝoj organizitaj de Esperanto-France

Maritza Gutierrez Gonzalez, ĵurnalistino de Radio-Havano kaj ankaŭ estrarano de UEA, prelegis pri « Kubo, inter revoj kaj realeco » :

- en Marseille, marde la 26-an de Aprilo.

- en La Ciotat, merkrede la 27-an de Aprilo, plus aparta invito de asocio franca-kuba.

5.2 Prelegoj kadre de la federacia kongreso

La sabaton antaŭ la membrokunveno en Saint-Raphaël, la 21-an de Majo, okazis :

- ronda tablo pri Japana katastrofo kaj nuklea energio kun Patrick Lagrange kaj Renée Triolle, kun paralela konversacia rondo animata de gesinjoroj Vilain.

- prelego pri Lidja Zamenhof far Monique Arnaud kun paralela konversacia rondo.

5.3 Vizitoj de eksterlandanoj

Hori Jasuo kaj Arai Toshinobu havis grandan sukceson kiam ili vizitis lernejojn : Freinet-lernejon de la Pomme (13), mezgradan lernejon de Saint-Bonnet (05) kaj infanĝardenon de Chabottes (05). Saman sukceson ili havis en la Maljunulejo de « MGEN » en Saint-Cyr (83), kie ili montris kolekton de muzikiloj.

Kaligrafio estis proponita dum la Forumo de Asocioj en Marseille (13) kaj vespere okazis prezentado de la dramo de la lando al plenkreskuloj en La Ciotat, Gap kaj Saint-Bonnet.

Neatendita vizito de Nederlandano : Hans, el Maastricht, vizitis la kursejojn en Marseille, La Ciotat kaj Aix.

5.4 Aliaj aranĝoj

Reĝa kuko : En Marseille kaj La Ciotat (13), la lernantoj de la kursoj festis la reĝojn ; kaj laŭ la loka kutimo, plurfoje !

En Saint-Raphaël (83), reĝa kuko anticipis la membrokunvenon la 23-an de Januaro.

Multaj federacianoj partoprenis Esperantajn kongresojn aŭ renkontiĝojn (francajn kaj eksterlandanajn) kaj staĝojn. 33 Provencaj partoprenis en IREM, en Sete, je Pasko.

Komuna tagmanĝo en Agay (83) la 26an de Junio : bona momento por adiaŭi kun la hotelo « Le Renouveau », kie konstante estas vizitantoj el tuta Francio, kaj okazo amikece festi la finon de la lernojar.

6-Venontaj agadoj :

6.1 M.E.S.

Mediterranea Esperanto Semajno okazos en les Issambres de la 25-a de Februaro ĝis la 3-a de Marto 2012.

6.2 Nacia Kongreso

En Saint-Aignan (apud Nantes) de la 25-a ĝis la 29-a de Majo 2012 : federacianoj partoprenos.

6.3 Regiona kongreso

Duregiona kongreso en Romans, kunorganizita de Esperanto-Provence kaj Rhône-Alpes-Esperanto, por festi la centjariĝon de la loka klubo : la 22-23-24-ajn de Junio.

6.4 Marsejlo 2013

Marsejlo estos Eŭropa urbo de Kulturo. Esperanto-La Ciotat sinproponis por reprezenti la Federacion kaj proponis diversajn agadojn (kvankam ni scias, ke ne estos mono). Dosiero estis transdonita al la urbodomo en Majo :

- demando pri la lingvo-politiko de la organizantoj (ĉu uzi nur la anglan apud la franca, kaj tiel kontraŭstari la leĝon Toubon de 2004 pri uzo de fremdaj lingvoj ?), kaj propono pri esperantigo de la TTTejo.
- traduko de artikoloj el Vikipedio (jam faras la grupo de Marseille).
- aranĝo de kolokvo pri "Lingvoj kaj kulturoj de Mediteraneo".
- 2 koncertoj : Duoble Unu en Novembro 2012 kaj Jomo en Februaro 2013).
- ekspozicio pri la lingvoj de Mediteraneo.
- prelegvojaĝo de esperantisto el alia Eŭropa Kultururbo en 2013, Kosice (Ĉekio).

6.5 Esperanto-Provence

Jen la ĉefaj traktindaj problemoj :

- daŭrigi la kompiladon de esperantistoj en Provenco surbaze de diversaj listoj.
- proponi kaj budĝetigi diversajn aranĝojn kadre de Marseille 2013, Eŭropa urbo de kulturo, tra Esperanto-La Ciotat.
- plibonigi nian informadon, internan kaj eksteran, per nia TTTejo.
- rilati kun aliaj asocioj, partopreni en iliaj aranĝoj.
- havi budon, disdoni informilojn, subskribigi la peticion estas bona okazo trafi homojn, kiuj eventuale konas nur la vorton «Esperanto», por informi pri la nuna evoluo de la lingvo.

Monique Arnaud

3 - Financa

Rapport du trésorier de la Fédération Espéranto-Provence concernant l'exercice 2011.

Je rappelle que notre exercice social est basé sur l'année civile.

Durant l'année 2011, trois stages ont été organisés, de près ou de loin, par la Fédération Espéranto-Provence.

Il y eut un premier stage concomitant à l'Assemblée Générale ordinaire en mai.

Deux autres ont eu lieu à La Ciotat, un début octobre sur la présentation de l'espéranto et l'autre, fin novembre pour des niveaux plus élevés. Il en résulte, pour l'ensemble, un solde positif, qu'il soit linguistique, administratif ou financier.

Si je rédige et fais éditer ce rapport écrit en français, c'est uniquement pour respecter la loi française qui oblige toutes les associations déclarées à archiver l'original de ses rapports et procès-verbaux d'Assemblée Générale ainsi que les procès-verbaux de Conseil d'Administration dans la langue de la République (*définie par la première phrase de l'article deux de la Constitution Française*), et ce pendant toute la durée de la vie de la structure.

Le renouvellement des cotisations est toujours le même souci, 73 adhérents en 2011. Doit-on faire des relances systématiques, par courrier, par courriel ou par téléphone ? La question sera débattue lors de l'Assemblée Générale.

Le fait d'avoir rajouté une ligne de don au formulaire d'adhésion ou de renouvellement a été compris par deux de nos adhérents. Je donnerai le nombre d'adhésions 2012 lors de l'Assemblée Générale.

Cette année encore, notre résultat financier est positif, mais d'année en année il se réduit et nos actuelles réserves financières ne sont pas inépuisables.

Il me paraît urgent de procéder, et ce dès le début de l'année 2013, à l'actualisation du montant de la cotisation annuelle. Cette question a déjà été abordée en Conseil d'Administration et doit être entérinée par l'Assemblée Générale.

Cette Assemblée Générale ordinaire est toujours appuyée sur un stage et a lieu beaucoup trop loin du début de l'exercice - assis sur l'année civile comme précisé plus avant - cinq mois cette année. Il serait logique, pour valider la comptabilité, le compte de résultat, le bilan et le budget prévisionnel ; pour orienter la fédération pour l'année à venir ; pour mettre en place une équipe et un projet d'actions... de réaliser cette Assemblée Générale avant la fin du troisième mois de l'année, durant une période faible en activités.

Miramas, le 20 mai 2012

*Le trésorier
Michel Cerisay*

DEBIT		CREDIT		
6 060	Tonnelle pour foire et expo	15,00 €	7 500 Adhésions (5 € X 63)	315,00 €
6 220	Nom de domaine et hébergement	28,56 €	7 501 Espéranto France	134,10 €
6 230	Frais de gazette (édition)	225,00 €	7 610 Intérêts du CsL	91,35 €
6 240	Frais de déplacements 2010 réglés en 2011	435,00 €	7 720 Stages	1 926,00 €
6 240	Frais de déplacements 2011	285,40 €		
6 250	Frais de réception	83,14 €		
6 260	Frais postaux (principalement envoi gazette)	246,95 €		
6 270	Frais de stages	1 690,37 €		
	Sous total	3 009,42 €	Sous total	2 466,45 €
	Solde créditeur		Solde débiteur	542,97 €
	Balance	3 009,42 €	Balance	3 009,42 €

Soldes au 31/12/2011

Caisse	1 113,91 €
Compte courant	6,30 €
Compte sur livret	3 453,82 €

*Miramas, le 12 mai 2012
Le Trésorier, Michel Cerisay*

Kandidatiĝu al la Komitato

En asocio laŭ leĝo de 1905, la Komitato estas la asocia «Parlamento», kie ĉiuj estas bonvenaj. Se vi deziras pli konkrete kontribui al la laboro de Esperanto-Provence, proponi ideojn, kunlabori laŭ via fako, reprezenti vian urban klubon, nepre kandidatiĝu.

Sendu vian kandidatiĝon al la sekretario,
Monique Arnaud,
Ecole les Pelloux
Chemin de l'Espéranto
05500 BENEVENT

EL NIAJ FEDERACIAJ ASOCIOJ (KAJ TIES ANOJ)

05 - Espéranto-Gap

Je la 30-a de Aprilo okazis en la fama trinkejo « Kotopo », en Liono, dediĉo-seanco de mia libro : « Eble lunlumas ».

Tiu dediĉado kronis ekspozicion de fotografaĵoj el la libro.

pri la libro :

« Profesiaj nigra-blankaj fotografaĵoj akompanataj de mallongaj tekstoj, kiuj portas la leganton en surrealsman mondon. » UEA)

« Fantasto estas limo inter la reala mondo kaj la cetera. Ĉu vi restos ĉe la limo ?

Ĉu vi senpere povos solvi la problemojn ? La tekstoj estas en Esperanto kun du-paĝa traduko en la franca kaj same en la angla, sed la solvoj legeblas nur en Esperanto kaj nur se vi solvis lastan problemeton. La belaj fotoj estas allogaj. » (JP.B)

por pliaj informoj : <http://www.juliennicolas.com/fr/livres/eble-lunlumas>

informis Julien Nicolas

13 - Espéranto - La Ciotat

Staĝo en Nilvange

(departemento Mozelo - regiono Loreno)

En Nilvange, ni partoprenis en Esperanta staĝo kunorganizita de la asocioj Espéranto - Thionville, Francaj Esperantistaj Fervojistoj kaj Unuiĝo Artistista kaj Intelekta de la Francaj Fervojistoj.

La loko « La Kastelo » estas mirinda domo de ekstero de ŝtalo de la valo « Fench ». Ferindustrio ne plu ekzistas hodiaŭ ; restas nur kromaj produktaĵoj : ŝtalaj fadenoj, ferladoj, longegaj reloj por TGV faritaj per fero importita de Anglio !



nia belega staĝejo

Kian familian kaj amikan etoson ni ĝuis dum la semajno ! Matene okazis trinivelaj kursoj.

Ni partoprenis en la tria nivelo : « konversacio », kaj tute surprize retrovis kiel profesoron Renée Triolle, kiu kutime instruas al ni en La Ciotat ! Evidente, ni tre bone laboris.

Posttagmeze, vizitoj kaj promenadoj plaĉis al ĉiuj.

Ni vizitis la feran minejon de Rumelange en Luksemburgio, la romianan domon de Borg perfekte restaŭritan, en Germanio, la faman Eŭropan lokon Shengen kaj ankaŭ Thionville, kie nia ĉiĉeronino Renée laboris kiel profesorino de la rusa dum dek naŭ jaroj. Ni vizitis ankaŭ Duaumont, apud Verdun. Dum nia libera tempo, Bruno Henry veturigis nin tra Nilvange. En ĉirkaŭaj urboj, ni vidis kelkajn funkciajn uzinojn, sed malfeliĉe multaj aliaj estas definitive fermitaj. Ni promenadis ankaŭ tra Algrange kie multe da muroj estas ornamitaj de grandaj freskoj de loka artisto, Greg Gawra, ukraindevena. Li pentris diversajn laborojn de ferministoj de la regiono. Ni povis do kompreni la vivon de la enloĝintoj, sed kia tristeco estas vidi tiom da domoj kaj magazenoj fermitaj. Ni ankaŭ trairis plurajn urbetojn kiuj nun estas nur dormurbetoj. Efektive multe da personoj laboras nun en Luksemburgio.

Vespere okazis multe da prelegoj. Sekureco en trajnoj, liberaj programoj pri informatiko, Uralo en Rusio kaj filmo pri la Kopenhaga kongreso en 2011.



grupo de staĝantoj

Finfine oni povas dire, ke la partoprenintoj de tiu staĝo laboris, ludis, vizitis kaj multe profitis tiun tre agrablan semajnon en Valo Fench.

raportis Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva

Aperinta eseo

Laste aperis ĉe « Edilivre » eseo en la franca : « Il suffit de passer le pont », subtitolita « Manifeste pour une nouvelle civilisation ».

En ĝi, ĉapitro reklamas pri Esperanto kaj defendo de la gepatraj lingvoj.

Ĝiaj du aŭtoroj estas Michel Eliard, esperantisto en La Ciotat, konata de multaj el vi, kaj Patrick Pappola, kiu jam sekvis intensivan staĝon.

(*Papera kaj elektronika versioj de la verko estas mendeblaj sur la reto.*)

83 - Esperanto-Klubo de Fréjus-Saint-Raphaël

Pro manko de loko, ne eblis aperigi en la printempa numero la du sekvajn tekstojn pri la Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres ; jen ili :

La plejparto el la naŭdeko da esperantistoj aliĝintaj al la lernosemajno en Les Issambres (80 km okcidente de Nico) estis francoj, sed tamen ĝin spicis ankaŭ deko da eksterlandanoj, la plej foraj el Skandinavio kaj Kubo. La horaro de la studoj estis tipe franca : lecionoj de la 9a ĝis tagmezo, poste bonega manĝo en la restoracio de la Vacanciel-hotelo kaj almenaŭ 4-hora libertempo, kun unu plia leciono je la 18a, vespermanĝo inter la 19a kaj la 20a30, kaj varia vespera programo ĝis la 22a, kelkfoje eĉ ĝis la 22a30. Rimarku la litero-ludon en la nomo "Vacanciel" - feriojn en la ĉielo (en la franca : vacances - ciel). La loko vere estis belega, komforta kaj la manĝoj frandaj, la vetero dorlotis nin, kvankam kelkaj el ni malvarmumis aŭ mallonge suferis pri stomakaj problemoj.

La studantoj dum la lecionoj dividiĝis en 3 grupojn, kiujn instruis/laborigis eksterlandaj kaj francaj instruistoj : Perlo Miela el Hungario, Peter Zilvar kaj Zsafia Kóródy el Germanio, Daniel Moirand, Mari-Roza kaj Pascal Vilain el Francio. Mi mem studis en la grupo de Zilvar/Moirand kaj trovis tion interesa kaj amuza.

Dum la posttagmezaj paŭzoj okazis ekskursoj piede, ŝipe kaj aŭtobuse. Ni vizitis la urbon St-Tropez, lokajn ĉokoladmuzeon kaj ĉokoladvendejon, hejmrregionan muzeon, oliv-oleofabrikanton, promenis en malnovaj kvartaloj kaj en la bela Provenca naturo : sunombrelaj pinoj, cipresoj, agavoj, flave florantaj mimozoj, blanke florantaj migdalarboj, bonaj odoroj, susuroj de la maro kaj vento.

Vesperajn programojn produktis la kursanoj mem. Ni aŭdis pri la familia kaj Esperanta vivoj de belga paro, pri la Esperanto-urbo Herzberg, pri kulturaj diferencoj

inter francoj kaj finnoj. Aldone ni vidis belegan prezenton pri Sumatro. En la adiaŭa vespero oni kantis, deklamis, prezentis enigmojn kaj humorajn anekdotojn, finante ĉion per komuna dancado.

Mi vere povas rekomendi al ĉiuj la Mediteraneajn studsemajnojn !

verkis Saliko (Finnlando)

-o-o-o-o-o-

La krepusko falas sur la Mediteraneon la lastan tagon de la esperantoaranĝo M.E.S. Mi sidas en nia ĉambro kun belega rigardo super la maro, super la vilaĝeto Les Issambres kun helflavaj domoj kaj la francaj belaj tegolaj tegmentoj. Diversaj specoj de pinarboj, "ombrelaj pinarboj", cipresoj, olivarboj,



vido al Mediteraneo el hotela balkono

eĉ palmoj verdas inter la domoj. Ĉiun matenon dum tuta semajno estis mirakla sunleviĝo kun klara turkiskaj-rozkolora ĉielo, sur kiun ruĝa suno naskiĝas el la maro. Inter la verdaĵo flavas plenfloraj mimozoj. Tuttage la suno varmigis nin kvazaŭ estus someraj tagoj. Okazis ŝipa ekskurso al la insulo Saint-Tropez, kie unuflanke situas malnova vilaĝo kun malnovstilaj domoj sub deklivo, sur kiu gardas granda citadelo de la 17-a jarcento. Je la alia flanko de la insulo pluraj miliarduloj de la mondo konstruis al si grandajn, sed ne tre belajn somer-restadejojn. Post promenado en la vilaĝo kaj en la citadela parko flarante migdalarbajn florojn kaj mimozflorojn ni boate revojaĝis sur ŝaŭmaj ondoj laŭ sun-ora vojo.

Alian tagon ni ekskursis al vilaĝo Roquebrune en la montoj, kiuj ĉirkaŭas nian hotelon. Ni vojaĝis inter vitejoj kaj kampoj, vizitis olivoleo-fabrikon kaj lernis kiom da laboro necesas por fari unu litron da olivoleo de ok kilogramoj da olivoj. Unu el la preĝejoj de la vilaĝo oni konvertis en ĉokoladmuzeon kun malnovaj Suchard kaj alimarkaj skatoloj kun malnovaj bildoj kaj dekoraĵoj. Interesaj memoroj por tiuj, kiuj frandis tiun ĉokoladon en sia infanaĝo. Apude estis

ĉokoladfabriko kun gustumado de bongusta malhela ĉokolado. Laŭ belaj vojoj ni malsuprenvojaĝis al nia hotelo apud la maro. Ĉiun tagon ni promenis laŭlonge de la strando sur sablo kaj rokoj. Lun posttagmezon, Simone kaj mi promenis, parolis kaj eĉ dormis sur la strando.

Trifoje tage ni ĝuis plej varian, plej bongustan francan manĝaĵon ; diversspecajn fiŝojn, markonkulojn, viandon, multspecajn legomojn. Kune kun ĉiu manĝaĵo, krom la matenmanĝo, estis du specoj de vino. La ĉeno al kiu apartenas la hotelo nomiĝas Vacancel, kaj por tiu, kiu ĵus forvojaĝis de glitaj stratoj kaj vojoj, estis vera ĉielo. Ekster la grandaj fenestroj de la manĝejo kreskas grandegaj pinarboj tiel proksime, ke ni facile povis imagi, ke ni sidis sur la branĉoj de la arbo dum ni manĝis.

Okazis kursoj dum la antaŭtagmezoj kaj unu posttagmeza leciono ĉiun tagon. La intenco de la kurso ja estis evolui kaj lerni pli pri kaj en Esperanto. Vespere oni prezentis diversajn filmojn i.a. profesie belegan filmon pri Sumatra kaj informoplenajn filmojn pri diversaj esperantoaranĝoj. Peter Zilvar, Zsofia Korody, Perlo Miela kaj Daniel Moirand instruis la tri grupojn de « gelernantoj » el 11 landoj. La plej fora el Kubo, la plej multaj el Francio.

Entute ni estis 90 partoprenantoj.

Christine Graissaguel, unu el la administrantoj, multon faris por glatigi al ni etajn problemojn.

Monique Prezioso, la ĉeforganizanto, devis pasigi la tutan semajnon en hospitalo pro grava malsano. Mi ĝojis havi okazon saluti ŝin la lastan tagon. Ŝia edzo Laurent-Pierre prizorgis per medikamentoj nin ĉiujn, kiu estis atakitaj de vomado kaj gripo.

Dankon al vi ĉiuj por agrabla, neforgesebla esperanto-semajno.

Post la agrabla semajno en Les Issambres, la nordlandanoj Saliko kaj mi vojaĝis al Nice. Montriĝis, ke tie ni sukcesis trovi hotelon ĉe Rue Rivoli, tre proksime al Promenade des Anglais, kiun mi deziris vidi. Montriĝis ankaŭ, ke la fino de la Karnavalo okazis dum nia restado. Ni travivis la plej belan piroteknikaĵon kaj staris tiel proksime, ke la « steloj » multkoloraj preskaŭ pluvis super ni. Minuton post minuto venis pli kaj pli miraklaj elpafoj da bunta pluvo kaj ni opiniis, ke la lastaj fortoj estis elfjetitaj, sed venis novaj kaj novaj, pli kaj pli belaj multkoloraj stelpluvadoj.

Laŭ la Promenade des Anglais, kiu sekvas la golfon de Anĝeloj, ĉiuj domoj estas belaj arkitektaj laboraĵoj de « Belle-Epoque » (jarŝanĝo 1800-1900). La grandioza hotelo « Le Negresco », kun nomo de la rumano Henri Negresco, estis konstruita en 1912. Ĝi estas samtempe hotelo de 121 ĉambroj, 24 plurĉambraj apartamentoj kaj arta muzeo. La prezo

por ĉambro en tiu hotelo estas alta, super nia kapablo pagi. Nia hotelo estis privata vilao, kiu estis konstruita 1894. Tre ĉarma ĝardeneto por matenmanĝo en pli someraj monatoj, malnovspeca manĝejo, kie oni povis imagi la familion festi. La dormoĉambro estis eta kaj hejmeca.

Laŭ la tuta Promenado situas hoteloj, kazino, operejo ktp, ĉiuj en la stilo de La Bela Epoko aŭ Jugend. Ni promenis laŭ la maro ĝis La Malnova Urbo, kie ni ĉirkaŭiris en la malnovaj stratetoj inter altaj domoj. Ekster la fenestroj pendis lavita tolaĵo kiel sur fotoj de sudeŭropaj urboj. Ni eniris en du-tri el la barokaj preĝejoj, plenplenaj je artaĵoj, tro plenigitaj laŭ mia gusto, sed tio ja estas la baroka stilo. Oni devas pli studi kaj koni la diversajn artaĵojn por plene kompreni. La muziko, kiu sonis en la preĝejo, kreis agrablan restadon ripozan. Ni trovis etan hindan restoracion, kie ni ĝuis ŝafidaĵon kuiritan hindmaniere. Facile oni povas transportiĝi al Hindio (Barato). Posttagmeze ni promenis sur la Kastela Monto, ĝuis la arbojn, la belan rigardon super la urbo kaj super La Golfo de Anĝeloj. De sur la pinto de la monto falas granda akvofalo.

Ni intencis vidi la muzeojn de Marc Chagall kaj Henri Matisse, sed ni rimarkis, ke nek la tempo, nek niaj fortoj sufiĉas por ĉio.

Unuan tagon ni matenmanĝis en la ĉarma manĝejo de Villa Rivoli, la duan en tipe franca eta kafejo/trinkejo, kie ni ricevis tute ĵusbakitan « baguette » !

Ekster la hotelo ni trovis buson, kiu kondukis nin rekte al la flughaveno. Post trihora flugado ni alteriĝis en Arlanda/Stockholm. La tago finiĝis apud mia hejmo en nove malfermita balkana restoracio kun ŝafidaĵo laŭ balkana kuirarto.

Dankon al Saliko pro bona, eventoplana vojaĝo kun multe da ekzercado en Esperanto, kiu ja estas NIA komuna lingvo.

verkis Kerstin Rohdin (Svedio)



kaf-kaj-babilpaŭzo inter du programeroj